

Raporto

60a ALTE-konferenco 10-12 aprilo 2024 Bad Homburg, Germanio

Historia evento ĉe ALTE

La konferenco estis organizita de TELC, germana membro de ALTE, kiu havas grandan, tre modernan konstruaĵon, oficejon en Bad Homburg, apud Frankfurt am Main. La programo sekvis la kutiman strukturon, sed estis nun ankaŭ escepta pro la antaŭe akceptita **prezentado de la KER-ekzamensistemo de UEA**.

Antaŭaj paŝoj

1. En la 59a ALTE-konferenco en novembro 2023 en Romo mi rekomendis al ALTE nian prezentadon, ja el antaŭaj kunsidoj de la laborgrupoj mi eksciis, ke pluraj landoj, ekzamenofertantaj institucioj, universitatoj ne havas retajn ekzamenofertojn aŭ havas nur limigitajn funkciajn servojn.

2. Sekvis poste korespondado kun Dina Vilcu, ALTE-respondeculino pri la malpli ofte testataj lingvoj, gvidantino de la LWTL SIG (Less Widely Tested Languages Special Interest Group). Ŝi

- rigardis la ekzamen-paĝaron ĉe edukado.net kaj la modelcele senditan provekzamenmaterialon
- proponis retan kunvenon kun aliaj ALTE-specialistoj en februaro por prepari nian prezentadon en aprilo
- decidis pri prezenttempo kaj daŭro
- interkonsentis kun la gvidanto de la t.n. Teknologio en Lingvotestado Speciala Interesgrupo (SIG on Technology in Language Assessment) pri komuna programo por la du laborgrupoj, ke ĉiuj interesitoj povu aŭskulti la prezentadon pri la Esperanto-ekzamensistemo de UEA

3. En la februara reta kunveno (ALTE-UEA) partoprenis ankaŭ Katalin Kováts kaj Judith Meyer, kiun ni invitis por montri la programitajn materialojn kaj la internan funkciadon de la retaj ekzamenoj.

La reta preparolo estis tre sukcesa, do **UEA ricevis 20-minutan prezenteblon en la kunigita, duobla laborgrupa kunsido en la aprila konferenco de ALTE**.

Prezentado de la UEA/KER-ekzamensistemo la 11an de aprilo 2024

Mi kaj ankaŭ Judith Meyer partoprenis la 60-an konferencon de ALTE en Bad Homburg kiel reprezentantoj de UEA. La 11an de aprilo unue mi partoprenis en la kunsido de la malpli ofte testataj lingvoj, Judith en la teknologia speciala interesgrupo kaj poste ni ambaŭ en la komuna kunsido de la du SIG-oj. En ĝi partoprenis ĉ. 20-25 personoj, reprezentantoj de

- universitatoj
- ministerioj
- lingvoekzamencentroj

Post mia mallonga enkonduko pri la ekesto, historio de la Esperanto KER-ekzamenoj de UEA Judith Meyer

- prezentis la retan, programitan sistemon per ekzemploj pri ĉiuj partoj de iu modelekzameno,
- klarigis la tipojn de taskoj, la perkomutilan korekteblon, la varieblon de la taskaro,
- aparte menciis la adapteblon al aliaj lingvoj, ja la programo kapablas plenumi tion kaj testpretigantoj povas mem krei novajn taskojn per ĝi.

Ni parolis ankaŭ pri la preskaŭ komplete aŭtomatigita perkomputila korektado de la testoj, ĉar ĝi bone kaj rapide funkcias, nur por la individue verkitaj tekstoj ni bezonas trejnatajn kontrolantojn, prijuĝantojn.

Ni fiere raportis pri la senproblema funkciado de la ĝisnunaj, tutmonde rete ofertitaj Esperanto-lingvoekzamenoj, pri la bonaj rezultoj de la programita, sukcese lanĉita ekzamenplatformo.

Post meritita aplaŭdo ni respondis plurajn demandojn, ekz.

- pri la kontrolado de la ekzamenoj per kameraoj, proktorado,
- pri kreado kaj uzado de testbankoj,
- pri duobla prijuĝado, tio signifas, per du aparte laborantaj kontrolistoj kaj komparo de ilia poentdonado,
- pri permeso de uzado de reta vortaro por certaj ekzamentaskoj,
- aŭtomatigita informsystemo, dissendo de diplomoj, ktp.

Kelkaj delegitoj montris apartan intereson, la preparoloj kun ili daŭris eĉ poste en la kafopaŭzoj.

Ni ricevis gratulojn kaj laŭdojn de la gvidantoj de la du SIG-oj surloke kaj post la konferenco ankaŭ skribe, per retletero:

„This is just to thank both you and Judith for your presentation in the LWTL SIG in Bad Homburg.

It was really interesting and a very good example for the participants about how exams can be managed online. Both I and Dominique appreciated how well you presented and also the answers to the questions, which were clear, short and very targeted to what the people wanted and needed to know Very much appreciated indeed!

I hope to see you in the following ALTE meetings and I hope that this presentation helped with making your examinations better known among the ALTE members and not only.”

Laborgrupoj

Kiel kutime, mi partoprenis ankaŭ en aliaj programeroj, en la laborgrupo pri ekzamenoj por junaj lernantoj (**YL SIG**). Estis interese aŭdi pri novaj esploroj, simpligitaj testoj por junaj lernantoj, ekzamenmaterialoj por tiu aĝgrupo (6-12 jaruloj). Oni raportis ankaŭ pri esploroj ekz. pri la nuntempe uzata vortprovizo de dekjaruloj, pri perkomputilaj ekzerc- kaj testmaterialoj por la juna generacio, pri A1 kaj antaŭ-A1-nivelaj testoj kaj pri atestiloj pri akiritaĵoj, plenumitaj taskoj, niveloj.

Prelegoj

El inter la posttagmezaj programeroj mi elektis prelegon de Gaby Probst (Universitato de Aplikataj Sciencoj en Fribourg, Svislando). La temo estis instruado, lernado kaj testado de plenkreskuloj, faklaboristoj, ktp. Ŝi menciis multajn utilajn komputilajn helpilojn, retajn servojn por instruistoj, ekzercpreparantoj, lernaplikaĵojn, uzon de AI por certaj taskpreparoj, ktp. Jen kelkaj: Quizzlet, Kahoot, Crossword generator, Mindmeister, Jamboard, Wordwall, Learningsnacks, Onenote, classroomscreen.com, wooclap.com, ktp. Mi devus havi multe da tempo por enigardi, kontroli ilian uzeblon ankaŭ por niaj celoj,

Aliaj programeroj

ALTE ofertis bonajn servojn en la TELC-konferenceto, manĝojn, kafon, kukon, trinkaĵojn, ktp. en sia sidejo.

Okazis urbogvidado en Bad Homburg kaj poste la kutima bankedo, ĉi-foje eĉ kun tre profesinivela muzikgrupo kaj tre varia, riĉa bufedo.

Estontaj kunvenoj:

- rete, pri la Referenckadro, ĝia modernigo: 08. majo, 2024
- pri la Manlibro, Barcelona, oktobro 2024
- 61a ALTE-Konferenco ĉe Yunus Emre Instituto en Istanbul, Turkio (6-8.11.2024)
- Por 2025 ALTE ricevis inviton de Universitato Pécs, Hungario.

